FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Año V (N.° 53)

# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 5

MAYO 1953

RUZAFA, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

## EL MOVIMIENTO SE DEMUESTRA ANDANDO

Pocas personas sensatas se atreven a emitir juicios desfavorables al Esperanto. Todo el mundo lo considera como una idea plausible, digna de ser difundida, y que algún día verá su plena confirmación oficial, como instrumento obligado de comprensión internacional.

Ahora bien; son pocos, muy pocos, los que, aún reconociendo las buenas cualidades del Esperanto, para cumplir con su cometido de idioma auxiliar, se deciden a emprender su estudio y formar en la legión de los que pueden probar ante el mundo, que el Esperanto es ahora ya una maravillosa realidad práctica, y no una aspiración abstracta sin resultados tangibles.

Lo comprendemos. ¡La vida actual es tan febril!... Se necesita tanto estar, a cada momento, atentos a la materialidad de la existencia; se precisa con tanta premura alcanzar lo necesario para vivir decorosamente, que son bien pocos los momentos que se pueden dedicar al recreo del espíritu y a la adquisición de conocimientos cuya índole no sea profesional. Todos quisieran conocer el Esperanto, pero aunque para aprenderlo cuesta infinitamente menos esfuerzo que para balbucear cualquier idioma nacional, no por eso hay que esperar que el Esperanto se aprenda por infusión automática. Hay que estudiar poco, pero hay que estudiar. Se necesita practicarlo algo, escribir algunas cartas, sostener alguna charla, para irse soltando poco a poco, hasta llegar a «pensar» en el idioma auxiliar. Al llegar a la meta, todos quedan maravillados de haber conseguido la cosa por tan poco esfuerzo. Pero, cuando se contempla la cuesta desde abajo hay que tener voluntad para subirla, pechando con los obstáculos de la diaria lección.

Este es el principal motivo por el que son relativamente pocos los que se deciden, animosamente, a estudiar el Esperanto. Y, concretamente, su inhibición se deduce, en primer lugar, por la falta de visión del futuro inmediato. Muchos se preguntan: «Y, cuando lo sepa, ¿qué?» «Que ¿qué?» Pues, esto: Cuando se sabe el Esperanto, se experimenta, en primer lugar, una agradable sensación de riqueza espiritual. Si no fuera porque los esperantistas son incapaces de sentimientos mezquinos, considerarían a los demás con cierta lástima por su carencia de idioma auxiliar. Esa, que podríamos llamar euforia intelectual, produce la sensación de vivir en un mundo mayor, de límites insospechadamente remotos... Luego, se puede ampliar hasta esos límites la esfera de la amistad y del afecto. Todos los esperantistas tienen amigos de verdad en los más apartados rincones del mundo, dispuestos a servirles a la primera indicación. Se llega a conocer, directamente, la manera de pensar, vivir y reaccionar de gentes de otros países. Se aprende, de manera vívida, la geografía, la historia y la vida actual de otras naciones. Si viaja, encuentra siempre quien le acompañe, aconseje y acoja con familiar afecto.

## BILBAO ATENDAS VIAN VIZITON POR MONTRI SIAN GASTAMECON!

Tial, la nomo de la bela kongresurbo estu fiksa celo en via memoro

Y sin salirnos de lo práctico libros, clásicos y modernos, revistas, folletos, periódicos, informes, a profusión... Y lo que es mejor, la evidencia de que, llegado el momento de tener que conversar, o hasta de discutir, con esperantistas de otros países, el idioma auxiliar ha de ser un perfecto instrumento de comprensión. Y, como el movimiento se demuestra andando, invitamos a los escépticos, especialmente a los que se creen con autoridad en materia lingüística, a que presencien nuestras tareas congresales, durante nuestra convención anual, que este año, durante el próximo Agosto, tendrá lugar en Bilbao. Serán bienvenidos; y, si se despojan previamente de sus prejuicios, podrán observar como, por medio del Esperanto, no sólo los españoles, sino las decenas de extranjeros que allí acudirán, se desenvolverán con soltura y hasta con elegancia de estilo, en sus discusiones. Podrán ser testigos de un magnífico torneo literario, en el que jugarán, con rivalidad empeñada, las producciones de la cálida musa latina con las más sensibles manifestaciones de la inspiración escandinava. Podrán observar como, en grupos y corrillos, departen, con espontánea facilidad, congresistas procedentes de los más diversos lugares del mundo. Y, por fin, si llevan su curiosidad hasta el último grado, podrán ser testigos de que la palabra de Dios, en la basílica de Nuestra Señora de Begoña, durante la misa del Congreso, puede hacerse comprender por fieles de una docena de naciones, gracias al Esperanto.

Si el movimiento se demuestra andando, no se podrá exigir demostración más cabal. Sólo faltará querer ver, querer comprender, y lo que es más árduo: querer deducir...

# HISPANA KRONIKO

**VALENCIO.**—Inter la oftaj vizitoj de eksterlandaj gesamideanoj al nia urbo, elstaras tiu de germana karavano, gvidita de S-ro S. Ziegler, diligenta Prezidanto de «Germana Esperanto-Asocio». La vizito okazis dum la dimanĉo 12an de Aprilo; tre mallonga estis la restado de tiuj germanaj geamikoj —inter ili, kelkaj estraranoj de G. E. A.— sed, dum ilia trihora akompano, la Valencia samideanaro klopodis agrabligi la viziton. Tial ke ne estis tempo por montri al ili ĉiujn urbajn vidindaĵojn, oni kondukis ilin ĝis la supro de *Micalet* (Mikaĉjo), la tipa sonorilturo de la Katedralo, de kie ili povis admiri la panoramon de la urbo, kaj havi ideon pri ĝi. Bonŝance, en tiu tago mem, oni solenis la feston de Sankta Vincento Ferrer, patrono de Valencio; okaze de tio, la vizitantoj povis vidi kelkajn aspektojn de tiu folklora aranĝo: publikaj teatraĵetoj, ludataj de infanoj, kun mezepokaj kostumoj, antaŭ belaj altaroj el veluraj drapiraĵoj, starigitaj en pluraj stratoj kaj placoj, kio ege multe plaĉis al niaj gesamideanoj en tiu vere memorinda tago, same agrabla por vizitantoj kaj vizitatoj.

**CIAÑO - SANTA ANA (Oviedo).** — Niaj amikoj el tiu astura urbeto ĝojas supermezure, ĉar laŭ permeso de la provincestro, ekde la 7an de pasinta Aprilo, oficiale funkcias la tiea Esperanto-Grupo, je nomo «Verda Kolombejo», kun tridek-sep membroj. En la unua ĝenerala kunsido, oni elektis kiel prezidanton kaj sekretarion, respektive, la fratojn Alcibiades kaj Adonis González Meana, konataj entuziasmaj fervoruloj, dank' al kies klopodoj efektiviĝis la alsopirata deziro. Antaŭen, do!

**BILBAO.**—Ankaŭ en la kongresurbo, elverŝiĝas la ĝojo inter niaj amikoj, pro simila motivo. La iam grava Esperantista Grupo de Bilbao denove jam oficiale funkcias, kun pli ol cent membroj. En la unua laŭleĝa eksterordinara kunsido, oni elektis la Estraron laŭ jena konsisto: Prezidanto, Eugenio Lunate; vicprezidanto, Teodoro Elizondo; sekretario, José Luis Muñoyerro; kasisto, Tomás Apraiz; konsilantoj, Eduardo Larrouy, Cecilio Olalla, Luis de Otaloa, Julio J. Juanes kaj Tomás Bustos (blindulo). Tiu ĉi agrabla fakto venas tre oportune por masoni pli firme la sukceson de nia jam tre proksima Kongreso, kiu siaflanke multe utilos por revigligi kaj antaŭenpuŝi la Movadon en la tuta Nordo, kie la nunaj klopodoj ne estos vanaj.

## NI PROFITU ĈIUJN OKAZOJN

Post la grava katastrofo, kiun suferis dum pasinta Februaro la simpatia Nederlando, la populara radiostacio RADIO BARCELONA malfermis donacliston por helpi la aŭdantojn de RADIO NEDERLANDO. Ĉiutage, je la dua horo posttagmeze, oni legis la listojn de la alportaĵoj por tiel nobla celo. Vere, kun plezuro, mi povis scii pri diversaj donacoj kun klarigoj, kiel la sekvantaj: «Esperantistaj geedzoj, 30 ptojn.»; «Esperantisto el Sans (Barcelona kvartalo) 25 pesetojn»; «Esperantisto memorante siajn korespondantojn el Nederlando, 25 ptojn.»; k. t. p. Sed ankaŭ mi aŭdis nomojn, kiuj sonis al mi kiel samideanaj, kvankam la donacinto ne prezentis sin kiel esperantisto. Laŭ mia humila opinio, tiuj lastaj malprofitis bonan okazon por montri la viglecon de nia movado. Tia propagando estas efika, ĉar irante tra la stratoj de mia vilaĝo, multaj geamikoj haltigis min:

—Ĉu vi aŭdis la elsendojn de RADIO BARCELONA? Multaj esperantistoj helpas la nederlandanojn. Aŭdigu, do, la vorton ESPERANTO en ĉiuj eblaj okazoj! **RAMON MOLERA - Moyá**




## XIV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

### 7 - 8 - 9 - 10 de Agosto de 1953 en BILBAO

**Ya son más de doscientos los adheridos, cuyo número aumentará, de ahora en adelante, a ritmo creciente, pues, además de todo el Norte, las ciudades catalanas de abolengo esperantista es de suponer que estarán representadas con una nutrida concurrencia. Madrid y Zaragoza aportarán el prestigio de su nombre. Valencia asistirá formando compacto bloque en alegre caravana. Se espera de un momento a otro recibir la conformidad a la rebaja de ferrocarriles, para facilitar así el viaje a los amigos en poblaciones lejanas que, con su presencia, confirmarán la firmeza del esperantismo español**

Están a la venta, magníficamente estampadas a SIETE tintas, las vistosas postales del Congreso, al precio de coste:

**De 1 a 24, UNA peseta cada una ◆ De 25 en adelante, a 0'75 pesetas cada una**

**¡El tiempo apremia! ¡Apresuraos, pues, ante la seguridad de unas jornadas inolvidables!**

**Comité Organizador del XIV Congreso Español de Esperanto.** Ronda, 32-BILBAO

# KIAN PARTON DE ORANĜO PREFERE VI MANĜAS?

**En ĉi tiu monato, kiam en la Valencia regiono la oranĝarboj estas saturitaj de oranĝfloroj, kiel aroma promeso de granda rikolto de tiu bongusta frukto, plezure ni represas artikolon pri tiu temo el japana gazeto «La Horizonto», de samideano Hidetosi Iwamoto, kies kuriozaj konkludoj eerte multe interesos niajn legantojn.**

Oni ĝenerale scias, ke la gusto de oranĝo estas influata de kelkaj faktoroj: tero, sterko, kulturtekniko kaj aliaj. Nun vi eble volus scii, kiu parto de arbo donas bongustajn oranĝojn, kaj plie kiu parto de oranĝo estas plej bongusta.

Bongusteco de oranĝo estas influata de la kvanto de acido kaj sukero en la suko. Oni ordinare sentas bonguston de oranĝo, kiu enhavas malpli multe da citrata acido ol 1 % kaj pli multe da sukero ol 8 %. Ju pli multe da sukero sin trovas en oranĝo, des pli multe oni sentas dolĉecon. Bongusteco kaj dolĉeco ne estas paralelaj. Se acido ankaŭ multiĝas kun sukero, la gusto fariĝas pli densa, sed ne pli dolĉa. Tiel, nura dolĉeco ne estas bongusteco. Ideala bongusteco de oranĝo rezultas, kiam oranĝo enhavas kiel eble plej multe da sukero kaj taŭgan kvanton da acido. Tiaj bongustaj oranĝoj enhavu pli ol 9 % da sukero kaj 0.8-0.9 % da acido. Se ni kalkulos la gradon de sukero: acido, ĝi estu 10. Se la grado estas pli alta ol 10, tia oranĝo estas forte dolĉa.

Suko de fruktoj enhavas acidon, sukeron, kaj aliajn diversajn solveblaĵojn. Kvanto de sukero en tuta solveblaĵo de oranĝo estas 73 % tuj post la rikoltado. Oni ĝenerale mezuras tutan solveblaĵojn kaj sukerojn de fruktoj, kalkulante la gradon en tuta solveblaĵo: acido en fruktoj por facile kompari la dolĉecon. Kiu flanko de la arbo donas bongustajn oranĝojn? Laŭ S-ro I. Takahasi, oranĝoj produktitaj en suda kaj norda flankoj de arbo enhavas jenajn kvantojn de tuta solveblaĵo: acido, kaj sukero:

| | Tuta solveblaĵo | Acido | Grado de dolĉeco |
|---|---|---|---|
| Suda flanko | 11.0 % | 0.88 % | 12.35 |
| Norda flanko | 11.6 | 0.99 | 11.67 |

Ĉi tiuj ciferoj montras, ke la oranĝoj produktitaj en suda flanko de arbo estas pli dolĉaj ol tiuj en norda flanko. Komparante la ciferojn oni vidas, ke la sudaj oranĝoj enhavas malpli multe da acido; kaj pli alta dolĉeco devenas de malmulteco de acido, sed ne de multeco de sukero. Ĝisnuna komuna kompreno insistas, ke la sudaj oranĝoj estas pli bonaj, ol la nordaj, kaj ankaŭ kelkaj sciencaj raportoj tion asertis, sed estas interese, ke laŭ la vidpunkto de bongusteco (ne de dolĉeco) la nordaj oranĝoj estas pli ŝatindaj ol la sudaj. Kiu parto de oranĝo estas pli bongusta, suda aŭ norda? Duoniginte oranĝon en sudan kaj nordan partojn, oni analizis ilin kun la sekvanta rezulto:

| | Tuta solveblaĵo | Acido | Grado de dolĉeco |
|---|---|---|---|
| Suda duono | 10.0 % | 0.83 % | 12.15 |
| Norda duono | 10.6 | 0.87 | 12.20 |

La du partoj similas unu kun la alia, koncerne la gradon de dolĉeco. Nur iomete pli simpla estas la gusto de la suda parto de oranĝo. Mi faris eksperimenton pri oranĝo «Citrus Natudaidai» kaj akiris saminklinan rezulton. Do, la inklino pri oranĝo estas ĝenerala. Se vi volas manĝi dolĉan oranĝon, manĝu la nordan duonon de la oranĝoj, produktitaj en la suda flanko de arbo. Se vi volas manĝi bongustan oranĝon, manĝu la sudan duonon de la oranĝoj, produktitaj en la norda flanko de arbo.

## ◆◆ JAM ONI PROFETIS, ANTAŬ TRI JARCENTOJ... ◆◆

*Theophraste Renaudot, kuracisto kaj ĵurnalisto, mortinta en 1652, fondis la «Gazette de France» kiu, subtenata de Kardinalo Richelieu, iĝis oficiala organo de la franca registaro. En sia gazeto, Renaudot kutimis esprimi siajn ideojn; inter liaj opinioj, ni notu tiun pri universala lingvo: «Tiu lingvo—li diris—estus bona helpilo por homoj vojaĝantaj eksterlanden; ĝi devas esti simple kaj facile lernebla. Sed nun mia ideo ŝajnos utopia; ni mem ne konos tiun lingvon, sed niaj nepoj ĝin uzos». Tiel, antaŭ tricent jaroj, Theophraste Renaudot profetis la triumfon de Esperanto.*

*El «La Fervojisto» monata bulteno de Franca Fervojista Esperanto-Asocio.*

**De ekstremo al ekstremo de la mondo ampleksas nia komprenpovo!**

*La agrablaj aferoj de la vivo ekzistas por esti ĝuataj.* STEFAN ZWEIG.

## FILO DE SIAJ GEPATROJ

Lerta ŝtelisto kaj eĉ pli lerta ŝtelistino geedziĝis. Unu jaron poste, al ili naskiĝis infano; sed li venis en la mondon kun tia difekto, ke lia dekstra mano ĉiam estis daŭre fermita. Tio ĉi kaŭzis ĉagrenon al la gepatroj, ĉar malgraŭ klopodoj de kuracistoj, oni ne sukcesis malfermi lian manon. Iun tagon, amiko vizitis ilin. Tiu amiko garnis sian veŝton per dika ora ĉeno, kun pendaĵo el sama metalo. En la momento, kiam li alproksimiĝis al la infano por karesi lin, la bubo kvazaŭ mirakle malfermis la manon kaj ekkaptis la riĉan ĉenon. Kaj... samtempe aŭdiĝis metala brueto ĉe la planko, ĉar de la fermita maneto de la bubo falis ora ringo de la akuŝistino, kiun li gardis en sia fermita mano, ekde la tago de sia naskiĝo...

**XANTI** (Eibar)

## KONDOLENCO SUR RUBANDO

Kiam la bona Petro sciis pri la neatendita morto de sia amiko Johano, li ne trovis konsolon. Li alkuris komuniki la malgajan novaĵon al Ludoviko, alia amiko, kiu, cetere, jam legis la nekrologon en la ĵurnalo.

Ili ambaŭ, do, kune larmis rememorante la multajn meritojn de la forpasinta kamarado. Subite Ludoviko diris:

—Kara Johano: plorante, ni ne honorigas la memoron de nia amiko. Ni devas aĉeti grandan florkronon, kiu akompanos lin survoje al la alia vivo. Iru do mendi ĝin ĉe la florvendisto, kiu devas kompletigi ĝin per larĝa nigra rubando kun jena surskribo el orkoloraj literoj: «Ripozu pace», sur la du flankoj; kaj se restas loko: «Ni renkontos vin en la ĉielo!»

Petro iris rapide al la florvendejo, kaj li revenis kun tre bela florkrono, kies larĝa kaj longa rubando tekstis jene:

RIPOZU PACE SUR LA DU FLANKOJ KAJ SE RESTAS LOKO NI RENKONTOS VIN EN LA ĈIELO!

**VILHELMINA BOSCH** (Valencio)

Viro ploris apud tombo, dirante:
—Kial vi mortis? Ho, kia ĉagreno!
Vidante tion, demandis preterpasanto:
—Amata parenco, ĉu ne?
Ho, ne; la unua edzo de mia edzino!

## SFINKSA ANGULETO

### STRANGA ŜTUPARO

X X................ *nomo de litero*
X X X X.......... *substantivo*
X X X X X X.... *parto de floro*
X X X X.... *substantivo*
X X.... *nomo de litero*

***En ĉiu signeto de ĉiu vertikala linio ĉiam devas esti la sama litero. La du silaboj por la nomoj de literoj ankaŭ konsistigas, kune, dekstren aŭ maldekstren, du facilajn vortojn***

**Oni akceptos solvojn, por la premio, ĝis 13 Junio.**

SOLVO DE LA PROBLEMO **LA BARELOJ**
EN LA PASINTA NUMERO

***La unua fiŝkaptisto ricevis du barelojn plenajn, tri duonplenajn kaj du malplenajn. La dua, tri barelojn plenajn, unu duonplenan kaj tri malplenajn. La tria, du plenajn, tri duonplenajn kaj, fine, du malplenajn.***

## LA NEPOJ NIN BENOS!

**Al Nereida, mia ínfanino.**

Pravas vi, ho Majstro nia!
Jes: ja la nepoj nin benos.
Malgraŭ kontraŭstaro ĉia
NEPRE TIU TEMP' ALVENOS.

Vi, nuntempe bebo-bubo,
estu vigla batalanto
kontraŭ ĉia timinkubo
KIAM ĈIU MONDLOĜANTO.

Tiel la militfantomo
en la mondon ne revenos.
Kaj la homo, frat' de l'homo,
AMON, ĜOJON, PACON PRENOS.

Vi klopodu, kara mia,
esti inda konkeranto
de la mondo harmonia
PER LA LINGVO ESPERANTO.

NEPRE TIU TEMP' ALVENOS
KIAM ĈIU MONDLOĜANTO
AMON, ĜOJON, PACON PRENOS
PER LA LINGVO ESPERANTO.

**Alcibiades GONZALEZ MEANA**
**Ciaño - Santa Ana**

*En la ritmo de la vivo devas ekzisti paŭzoj, por renovigi tiun ritmon.*
RABINDRANATH TAGORE

**Bona eduko estas la plej bona heredo, kiun oni povas ricevi. — Cantú**

# ◆ LINGVA KONKURSO: LERNU TRADUKANTE! ◆

**Serĉante tra la densaj paĝoj de nia originala literaturo, ni elektas hodiaŭ por vi, kiel ekzercon, jenan tekston:**

Tasko n.° 5. TEKSTO: «Kaj, en rapida sinsekvo, la teleroj rondiris je la profito de raŭka kantisto, de straba ĵonglisto, de hundodresisto, de nekombita poeto, de malnova fortepiano... Sed, kiam mi rimarkis, ke la tuta ĥoro de l' Spicistoj ariĝas sur la scenejo, mi komprenis, ke, se mi poste devus doni nur unu soldon pokape, mi komplete ruiniĝos; tiom multenombraj estis la ĥoranoj». *Fragmento el novelo de la konata bonhumora verkisto Raymond Schwartz.* **Laŭ la jam ordinaraj reguloj, sendu la tradukon, ne pli malfrue ol la 1ª de Julio, al la adreso de**

**S-ro RICARDO QUILES, San Vicente, núm. 164 - VALENCIA**

***Pri la tasko n.° 3 trafis niajn manojn 27 tradukoj. Ni konstatas, ke ni ricevas ĉiam proksimuman nombron da solvoj, kaj ke la partoprenintoj preskaŭ ĉiam estas la samaj gesamideanoj. Ni gratulas ĉi tiujn konstantajn konkursantojn; sed ni esperas, ke multaj hezitemaj legantoj ne plu ŝanceliĝos kaj sendos al ni ankaŭ sian tradukon. Ni ĝojas sciigi niajn geamikojn, ke ni ricevis respondon eĉ el eksterlando. Temas pri germana samideano, kiu, tute ne sciante la hispanan lingvon, tradukis la taskon n.° 1 en la germanan kaj poste li tradukigis ĝin hispanen kaj sendis al ni la tekston en la tri nomitaj lingvoj. Nun ni ricevis tradukaĵon sub koverto, kun la stampo «La Tosca», sed sen indiko de la sendinto. El la 27 ricevitaj konkursaĵoj, pli ol la duono estas korektaj kaj apartenas al jenaj gesamideanoj:***

**S. R. R. - V. P. M. - M. A. P. S. - S. A. - J. I. V. - F. R. - R. M. - J. A. G. - J. M.ª F. A. E. - J. G. I. - J. S. - V. J. R. - G. C. - R. A. - L. Q. P. kaj tiu de «La Tosca».**

***Tamen, ni decidis doni la premion al tiu de S-ro Samuel Roca Rodó, el Barcelono, kiu sendube estas la plej korekta kaj bonstila. Kiel kutime, ni sendas al ĉi tiu samideano la libron*** ESPERANTO SESDEKJARA. ***Por kontrolo, jen la traduko de la koncerna teksto:***

«La Lingüística trata del fenómeno de la facultad humana de hablar, en su más amplio sentido. Todo sistema lingüístico oral o escrito, por el que los hombres se entienden, es objeto de su exploración. Por eso se interesa por las lenguas muertas de la misma manera que de las vivas; se ocupa, no solamente del lenguaje de los mayores, sino también de las palabras o frases de pequeñuelos de dos años; y examina, no sólo como los indígenas usan su idioma, sino, también, como los extranjeros manipulan aquella misma lengua».

*Palabras del Dr. W. Manders en el preámbulo de su obra «Interlingüística y Esperantología».*

## A TRAVÉS DEL ESPERANTO SE VIVEN LAS INQUIETUDES DEL MUNDO...

**En la reseña literaria de un libro de autor japonés, recientemente editado en España —«La ruta imperial» de Hanama Tasaki—, el culto periodista valenciano José Ombuena, sagaz explorador de aspectos y matices, hace unas certeras observaciones antes de formular estas interesantes preguntas: «¿Cómo es la guerra vista por un soldado japonés? ¿Cuáles son las reacciones íntimas de éste en las horas del éxito y en las del sacrificio? ¿Qué resortes íntimos le impulsan a la acción?» No sorprenden, no, estas interrogantes. Lo sorprendente es no haberlas escuchado antes para que nosotros, los esperantistas, una vez más, podamos mostrar la efectiva universalidad del Esperanto, donde en el Japón, precisamente, tiene una amplia difusión en todos los sectores sociales. Por eso mismo, la tremenda angustia de la pasada guerra no podía serle indiferente; y así, entre los varios libros publicados acerca de este tema, destaca el que lleva por título: «Aúskultu la vocojn de la Oceano» (Escuchad las voces del Océano), magnífica y apasionante recopilación de auténticos fragmentos de cartas de soldados japoneses que murieron en campaña. En este libro, vivo testimonio de nobles vibraciones, con la limpia objetividad de sus diversas opiniones, impreso y editado en el Japón mismo, y que puede ser leído, sin embargo, fácilmente por el más sencillo esperantista europeo, se contesta cumplidamente a las interesantes preguntas que acaba de formular el señor Ombuena en una de sus recientes crónicas literarias, comentando la edición española de un libro japonés, que seguramente NO habrá sido traducido directamente del idioma original... — L. H.**

**Por esperantisto, la tuta mondo fakte estas la tuta mondo!**

Kiel ĉiuj lingvoj parolataj en la mondo, Esperanto estas en konstanta progreso, akompanante novajn konceptojn en la tekniko, sciencoj, k. t. p. Ni ĉiam devas eviti la kreon de novaj radikoj, kiam oni povas uzi malnovajn terminojn sen malhelpo por la vera senco, kiun oni deziras elmontri. Ekzemple, kiam ni parolas pri kolomboj, ni povas diri, kiel nature oni diras en la naciaj lingvoj: korta, sovaĝa, montara, vojaĝa kolombo, ĉar la simileco en ĉiuj specoj de kolomboj estas evidenta. Se ni parolas pri poploj, ni ankaŭ povas diri: franca, itala, kanada, piramida, blanka, nigra poplo, eĉ tremanta poplo (tremolo); ankaŭ pri la diversaj specoj de timianoj: vulgara timiano *(Thymus vulgaris)*, alta timiano *(Thymus Mastichina)*, nana timiano *(Thymus Zygis)*, uzata en Portugalio por spici la olivojn, kaj medicina timiano *(Thymus serpilum)*; nigra solano *(Solanum nigrum)*, diabla solano *(Solanum sodomaeum)*, nomata en Algarvo «Tomato de la diablo» ĉar la fruktoj estas iom venenaj kaj la branĉoj tiel dornoplenaj, ke nek la diablo tuŝus ĝin. Pro tio, ke ekzistas diversaj specoj de fringeloj, kiam oni parolas pri la *Fringilla chloris* (france ***verdier***, hispane ***verderón)*** nature ni devas diri: «verda fringelo».

Sed la logiko ne ĉiam konsilas la uzon de tiaj rimedoj, ĉefe kiam la objekto esprimata ne havas similecon kun alia objekto, kies nomo estas esperantigita. Ekzemple, ni vizitas kampon, kie troviĝas kelkaj ŝadufoj (france ***chadouf***, angle ***stork***, hispane ***cigoñal)***. Kiel ni devas paroli pri ŝadufo ne uzante novan vorton? Tiamaniere ni dirus: «Ni vizitis kampon, kie troviĝis kelkaj

# KRITERI...
# ESPERANTIGO DE...

*de J. Félix Gomes* ...

**Kun plezuro ni prezentas la interes... portugala samideano spec...**

cikonioj», kvankam la plimult... ankaŭ oni diras gruo, parolante... termino estas internacia esprim... okazas la sama anomalio; kian... ampleksitaj la verda kverko aŭ... roblo *(Quercus robur)*, la suger... devas tamen rimarki la diferecon... tipoj de kverkoj: la verda kve... ***encina*** aŭ ***carrasca)*** ne perdas l... (france ***chéne rouvre***, hispane ***ro***... sugero (itale ***sughero***, france ***ch***... ***alcornoque)*** produktas la korko... estas notinda pro la beleco de... kermokverko (hispane ***coscoja***... En la genro de genistoj troviĝ... la gajombo *(Spartium junceum)*... doraj floroj. Ne konfuzu pri spar... de arbuto ankaŭ ekzistas profun... *(Arbutus Menziesii)* estas gigant...

# INTER LA PROZO DE LA E...

Kiam oni loĝas, kiel nun, en medio, kie la printempo kulminas en apoteozo de koloroj kaj parfumoj, estas malfacile --tre malfacile!-- eviti la tenton de ĝia influo, kiu logas al dolĉa nenionfarado. Ho, jes, sub la pompo kaj volupto de ravanta naturo, la poetoj emas longe ripozi sen zorgoj nek penoj, lasante sin luli de aromaj ventetoj, en kies trankvila zefiro ŝajne sin montras la muzoj, en formo de flirtantaj papilioj. Sed, kiam la revema poeto estas konscia filozofo, krom respondeca komisiito pri plenumenda tasko, oni devas spiti la tentojn, por manipuli la laborilojn, dum daŭra deĵoro, en la asignita laboro.

Kaj vi, kara leganto, jam scias, ke mia laboro ne alia estas ol tiu mem supraĵe rakonti pri la pulsanta trafiko de nia gazetaro, mezurilo de nia forto kaj spegulo de nia fervoro. Tial, do, jen la raporto rapide kaj tre diligente verkita, laŭ takto de triloj de bela kardelo, kiu najbare nestas:

Trans la Atlantiko, daŭre aŭdiĝas ankaŭ nia voĉo, ARGENTINA ESPERANTISTO renovigis sian fasadon kaj aperas nun en bela presita aranĝo; inter ĝiaj diversaj kronikoj, jen eta specimeno de aŭtentika kosmopolitismo: «Dum la unuaj tagoj de Januaro, aro da gesamideanoj amasiĝis en centra stacidomo por adiaŭi kuriozan grupon da homoj. Ili estis japanaj montgrimpantoj, speciale venintaj el sia antipoda lando, kun la ambicio supervenki la montegon plej altan el Ameriko: Akonkagvo. Sed okazis, ke inter ili estis japano loĝanta en Buenos Aires: nia konata samideano Katsuo Miyachi, direktoro de «Akoku Nippo». Tio pruvas, ke ekzistas harmonio inter kulturo kaj sporto, per ligilo de nia lingvo. BULTENO de Urugvaja Societo por Esperanto aperas preskaŭ nur en hispana lingvo, kun elektita materialo, tre utila por seriozigi kaj fidindigi nian aferon inter klera publiko. En unu el la kronikoj, oni diras tre laŭdajn vortojn pri la hispana movado. Jen, BRAZILA ESPERANTISTO, ĉiam en avangardo, montras fiere la kliŝon de la diplomo, kiun Brazilo gajnis en la Internacia Konkurso de U. E. A. Cetere, mi ĝojas prezenti plian brazilanon; temas pri BOLETIM DE ESPERANTO, bela literatura kajero, eldonita de kompetenta rondeto en Belo Horizonte. Sub titolo «Originala Literaturo» la nelacigebla pioniro Ismael Gomes Braga diras.

**Prudente fidante nur je nia propra forto, sed vigle kaj lerte uzante la plena...**

PRI LA

# NOVAJ VORTOJ

Vale de Figueira (Santarem)

kontribuon, kiun tre kompetenta
e verkis por nia gazeto.

komprenus pri birdo; tamen,
i birdo kaj pri maŝino, sed tiu
Pri diversaj genroj de vegetaĵoj
oni parolas pri kverkoj estas
mpla kverko *(Quercus ilex)*, la
*(Quercus coccifera)* k. t. p. Oni
kiu ekzistas en tiuj ĉi kvin ĉefaj
ko (france *chéne vert*, hispane
foliojn dum la vintro; la roblo
*le)* perdas vintre la foliojn; la
*ne liege*, angle *cork-tree*, hispane
la tozo (france *chéne tauzin)*
iaj folioj kaj ronda frondo; la
estas pli speciala pro la kermo.
kelkaj specoj, kiel ekzemple
notinda pro siaj flavaj bono-
*(Ligeum spartum)*. En la genro
j diferencoj: la granda arbuto
arbo, kreskanta en Usono, kiu

atingas 40 metrojn de alto kun 2 ½ de diametro; la unedujo *(Arbutus unedo)* estas, kontraŭe, malgranda arbo, kreskanta en la montaroj kaj ĉarnekoj (arbaroj en la iberia duoninsulo, kie kreskas sugeroj, kverkoj, robloj kaj sovaĝaj bestoj), kiu produktas bongustajn fruktojn: la unedoj (france *Arbre aux fraises*, hispane *madroño)* la gajubo (france *raisin d'ours*, hispane *gayuba)* estas malalta arbeto, kies folioj estas uzataj en la popola medicino.

Pri pluraj genroj de birdoj ankaŭ troviĝas malprecizaj esprimoj; estu ekzemplo la genro otiso, en kiu troviĝas birdoj tute malsimilaj, ĉu en la grandeco, ĉu en la koloro de la plumoj. La bustardo aŭ granda otiso *(Otis tarda*, angle *bustard*, france *outard*, hispane *avutarda)* estas granda birdo; la viro pezas de 7 ĝis 16 kilogramoj. La malgranda otiso aŭ simpla otiso *(Otis tetrax*, angle *litlle bustard*, france *canepetiére*, hispane *avutardilla*, *gallarón, sisón)* estas tre bela birdo, kiu pezas nur de 800 gramoj ĝis 1 kilogramo. Se oni parolas pri la subspecoj, tiam oni devas diri orienta otiso *(Otis tetrax orientalis)*, same kiel oni devas diri sudafrika bustardo *(Otis cafra)*, ĉar tiu ĉi birdo estas subspeco de la bustardo kaj ne de la simpla otiso, malgranda otiso.

Kvankam la vortoj sugero, roblo, tozo, kermo, frondo, gajombo, unedujo, gajubo, bustardo, ĉarneko, k. t. p. neniam devas eniri en la ĝeneralan vortaron, por ke ĝi ne estu tro granda kaj tro multekosta, mi opinias, ke ili devas aperi en la fakaj vortaroj kaj en la specialaj verkoj. Alimaniere, Esperanto estos ĉiam, tra la jarcentoj, lingvo de korespondistoj kaj de rutinuloj.

# SPERANTISTA GAZETARO

«La formado de granda originala literaturo en Esperanto, per kunlaborado de ĉiuj popoloj, estas la plej grava paŝo de la homaro». D-ro Wilson Veado en artikolo «Analogio kaj Esperanto» tiras interesajn konkludojn: «En la asocio pro alproksimiĝo, ni elvokas rilaton de efiko al la kaŭzo --fumo donas ideon pri fajro--. Tie ĉi kuŝas la origino de lingvo». Kaj, en simpla klarigo pri parto de urbo, oni elvokas apartan elstaran ĉarmon de Brazilo. Jen, do: «Urca estas la nomo de unu el la plej belaj kvartaloj de Rio de Janeiro. La maro borderas la pentrindan lokon; ĉe la marbordo, sennombraj virinoj, preskaŭ nudaj, kuŝas sur la blanka sablo por sin brunigi en la suno, kaj poste sin bani en la sala mara akvo». Ĉu ne ja sufiĉe loga reklamilo? Sed, *halti* mi ne povas kaj antaŭen devas *paŝi* ĝis alia ekstremo de la mondo, kvankam ĉiam en Esperantujo! SAMIDEANO, en eksterordinara numero, prezentas la tradukon de la japanlingvaj tekstoj, pri la atombombo en Hiroŝima, aperintaj en grava revuo. Tio ĉi estas ege valora dokumento, kiun Esperanto ebligas rekte al ni. LA REVUO ORIENTA, torĉo de la japana obstino, estas valora gramatika klarigilo kaj riĉa flakono de spiritaj esencoj. Kortuŝa titolo «Verda Stelo sur Tombo», apud sobra bildo, garnas jenajn vortojn: «En senhoma korto de malnova templo, ĉe la rando de Huzioka, apudmonta urbeto, en la gubernio Gunma, oni trovas inter muskokovritaj tomboŝtonoj neatenditan verdan steleton, ĉizitan sur brila marmora tabulo, kun epitafo en Esperanto. Ĉi tio estas la tombo de Ŝimazaki - Toŝikazu (1913 - 1946) filo de silkvendisto en la urbo. Milito forportis ĉi tiun junan pacamanton al ĉina fronto. Dank' al sia lingva talento, li servis kiel informisto kaj povis eviti sangverŝon. Ĉie en la fronto, li estis amiko de infanoj, kaj la loĝantoj tre bedaŭris, kiam li forlasis la lokon. Unu jaron post la japana kapitulaco, li revenis hejmen sur brankardo kaj baldaŭ mortis, postlasante maljunajn gepatrojn, junan edzinon, du infanetojn kaj multajn sonĝojn nerealigitajn. La epitafo estas farita laŭ detala indiko skribita en lia taglibro». Admirinde, tre admirinde...

Kaj la zefiro, kiu milde nun blovas, portas la delikatecon de tiuj vortoj subtile aŭdeblaj de **LA LEGEMA KOBOLDETO**

rimedon de tiu forto mem, sen hontinda hezitemo, ni povas fari multon!

# LAŬTPAROLILO DE LA ESPERANTISTARO

**KVANKAM MALFRUE RESPONDANTE...**

Al la artikolo de Donald R. Broadribb mi emas rimarki jenon:

La artikolo de S-ro Donald R. Broadribb montras, ke li ne komprenas la Esperanto-movadon, kvankam li publikas sian kritikon, tradukitan en Esperanton.

Nia internacia movado estas juna kaj postulas multe da tempo por atingi sian celon. Tial multaj naciaj lingvoj, ne ja nur la Angla, havas pli riĉan fak-literaturon ol Esperanto. Sed, dank' al la amo de la esperantistoj, ĝi kreskas, kunligonta kaj unuigonta la diversnaciajn fakulojn al fruktodona kunlaboro. Ne estas la celo de Esperanto anstataŭigi la naciajn lingvojn.

Estas laŭdinde, ke S-ro Donald R. Broadribb amas sian lingvon. Sed altigi sian propran nacian lingvon al internacia komprenilo estas aroganta ŝovinismo.

La aŭtoro donas jenan konsilon al la hotelisto: «Lernu nur iomete de la Angla lingvo, kaj vi estas helpata!» Tio estas tipa esprimo de sinadoranta Angleparolanto.

La Angla lingvo ne estas ideala. Ĝia ortografio estas malbona kaj ĝia gramatiko ne estas tiel facila, logika kaj praktika kiel tiu de Esperanto. La argumentadon kontraŭ Esperanto la aŭtoro konstruas sur nefirma fundamento dirante, ke la esperantistoj estas monoglotoj, t. e. ili nur konas sian propran lingvon. Mi povas informi S-ron Donald R. Broadribb, ke multe da esperantistoj ne estas monoglotoj, sed poliglotoj, kion la granda tradukado de la fremdaj lingvoj en Esperanton pruvas. Mi mem instruis dum 40 jaroj en fremdaj lingvoj, kiel lektoro. La aŭtoro skribas jene: «Ni ne nur rajtas demandi, kial tiel ne estas, ke oni uzas la lingvojn en tiuj praktikaj rilatoj». Mi povas informi S-ron Donald R. Broadribb, ke la Nederlanda kaj Skandinava flugadsocietoj reklamas per Esperanto. La samon faris la Angla laborista partio kaj la kooperativa societo. La deklaracio de la Unuiĝintaj nacioj pri la homaj rajtoj aperis en Esperanto. Ĉe la kongreso por mondparlamento estas decidita, ke Esperanto devus esti unu el la lingvoj de la kongreso. 80 japanaj sciencistoj, ankaŭ kemiistoj, decidis publiki siajn verkojn en Esperanto. En Japanujo ĝi estas koresponda lingvo ĉe grava partio.

Kaj por fini, mi devas sciigi, ke multaj vere liberalaj, inteligentaj Angloj estas esperantistoj.

**NILS CHRISTENSEN**
Hamar (Norvegujo)

## Ĉu vere «el la gramatiko al la etiko?»

Atentege mi tralegis la frontartikolon de la februara numero de BOLETIN.

Eblas rigardi la aferon el alia vidpunkto. La artikolisto venigas la etikon kiel rezulton de esperantismo; sed bedaŭrinde ĉi tio ordinare ne estas tiel, kiel oni diras. Esperanto, simple kiel lingvo estas nur ĉi tio: Lingvo. Sed, ne ĉiu parolanto, kiel ajn bele kaj flue li parolas nian internacian lingvon, povas esti nomata esperantisto; eĉ se tion oni asertas en iaj pli malpli oficialaj skribaĵoj. Esperantismo estas fratemo, koremo, karito. Ĝi ne estas io mistika, io religia, ĝuste; sed estas io homa, io ama. Ne ĉiu povas mastri sian koron; sed la horo sekvas iagrade la volon.

Por ni, la katolikoj, la afero estas simpla: Gracoverko ne estas memvoloverko; kio ne kontraŭstaras la aserton ke: «Paco estu donata al la bonvolemaj homoj!»

Mi tute sekvas la majstron, la samgentulon de la Majstro: Kie ne estas amo, kie ne estas pardono, kie ne estas bonvolo, tie ne povas nesti paco nek esperantismo.

Ni kore amu unu la alian, eĉ tiujn, kiuj nerimarkite, nevole, ĝenas nin; eĉ tiujn, kiuj age de la diablo malamas nin. Tiam ni rajtos prave nomiĝi *Esperantistoj.*

Multaj noble, sed ja erare, batalas serĉante la mondfeliĉon tra la vojoj de la nekredemo, de la senreligia frateco; ili vekiĝos baldaŭ; ili venos al niaj vicoj.

Mankoj ekzistas tie, kie ajn la homo metas la manon aŭ la cerbon; sed, kie ajn la bonvola koro batas, tie nepre venos konkordo, paco. La verko de Dio estas super la homaj neperfektoj. Serĉu la regnon de Dio kaj ties justecon; kaj ĉio alia estos donata al vi aldone... eĉ esperantismo!

**EŬMA** (Zaragozo)

**PER MALMULTE DA VORTOJ,** respondante al S-ro Vilhelmo Bosch, mi diras: Nuntempe, Esperanto sen Interna Ideo estas *nenio;* Interna Ideo sen Esperanto estas *io;* Esperanto kun Interna Ideo estas *ĉio.* Estonte oni vidos! **R. MOLERA** - Moyá (Barcelono)

# FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● FRANCIA.—En la fábrica «La Télémecanique Electrique» de Nanterre, cerca de París, se ha constituído un Grupo de Empresa esperantista, en la «Sección Deportiva y Cultural» de dicha factoría. La finalidad de esta constitución es organizar viajes por el extranjero para el personal de la fábrica, con vistas a estudios de la especialidad.

● ITALIA.—En la fábrica constructora de aparatos telefónicos «Stipel», de Torino, se está desarrollando un curso de Esperanto, a cargo del señor Mario Guzzi, con la participación activa de veinte asistentes, quienes al finalizar organizarán un Grupo que desarrollará sus actividades en la «Sección Cultural y Recreativa» de la empresa.

● YUGOSLAVIA. — El Ministerio de Correos editará un sello conmemorativo del 38 Congreso Universal de Esperanto, que se celebrará a finales de Julio en Zagreb, que aumenta el número de los ya editados. ¡Agradable faceta para los filatélicos!

● AUSTRIA. — En la ciudad de Graz se ha rotulado una plaza con el nombre de «Esperanto». En Viena ya existe rotulada, desde hace tiempo, la «Esperanto-strasse».

● SUIZA.—«Neue Berner Zeitung», de Berna, publica en su número del 4 de Marzo un artículo del Profesor de Literatura, en la Universidad de Neuchätel, doctor Edmond Privat, sobre el tema «El Esperanto nuevamente en la actualidad», con motivo de la favorable resolución recientemente discutida y adoptada por UNESCO en París.

● HOLANDA.—El «Club Esperantista Philips», constituído en la mundialmente conocida firma, con sede en Eindhoven (véase Boletín núm. 26, página 222), organiza una excursión a Wörgl (Austria) para los días 25 de Julio al 3 de Agosto. Este viaje está proyectado en plan económico, gracias a la magnífica organización y facilidad que presta el Esperanto, relacionando amigablemente a personas y entidades de países distintos.

● FINLANDIA.—«Oppikolulehti-Laroverktidningen», órgano de los catedráticos de Instituto y Universidad fineses, publica en su número de Enero un artículo sobre «El Esperanto presentado ante UNESCO, haciendo comentarios a la resolución de este organismo internacional y propugnando una adopción oficial del Esperanto en la próxima Asamblea General de Montevideo (1954), de la que se espera un provechoso resultado.

● NORUEGA.—«Bodö og Omegns Turistforening», de Bodö (Nordland) ha editado un folleto en Esperanto, sobre la ciudad del sol de medianoche. Puede solicitarse de de dicha oficina turística, remitiendo la dirección completa y un cupón respuesta.

● ESTADOS UNIDOS.—«New York Times» del 25 de Enero, en sus «Cartas al Director», publica una del señor Jack K. Mc. Fall, delegado de la ONU en Finlandia, apoyando la adopción de una lengua común para las relaciones internacionales; concluyendo que, si no es posible llegar a un acuerdo sobre un idioma nacional, se acuerde la enseñanza del Esperanto, que ya tiene demostrada su utilidad práctica en tal sentido.

● JAPON.—El Profesor Tosiyosi Miyazawa, decano de la Facultad de Derecho de la Universidad de Tokio, habló el 17 de Enero por Radio Tokio en favor del Esperanto, como idioma común para las relaciones internacionales. El Rector de la Universidad de Gunma publica en «The Gunma Journal of Medical Sciences» un artículo en Esperanto, a diez páginas, sobre un interesante estudio médico: «Miologio de la japano. Statistika raporto pri muskolanomalioj ĉe japanoj», que ha sido muy favorablemente comentado.

● INDIA.—En la famosa Universidad de Santiniketan, fundada por el gran poeta Rabindranath Tagore, el Esperanto está dignamente representado por varios profesores. Uno de ellos, el señor Lakshmiswar Sinha, va a emprender un viaje de estudios a través de Europa, donde hallará la cordialidad de los esperantistas, en la ruta de su recorrido.

## EL ESPERANTO EN LA PRENSA ESPAÑOLA

**El diario «JAEN», órgano de F. E. T. y de las J. O. N. S. de aquella provincia, publica con bastante frecuencia artículos sobre el Esperanto, como idioma neutral en las relaciones internacionales. Ultimamente ha publicado el artículo del Profesor Edmond Privat sobre el Esperanto ante la UNESCO. La Federación se congratula de este eco en pro del Esperanto, que se vislumbra en la prensa nacional, rompiendo lanzas a favor de la generosa idea que fomenta y difunde nuestra asociación nacional.**

# HO, KIA SURPRIZO!...

Iun matenon, antaŭ pli ol 40 jaroj, la sonorilo ĉe la fronta pordo tintis. Mi malfermis la pordon kaj vidis antaŭ mi ne konatan viron, ĉe kies brusto brilas verda stelo. Ha... vizito de neatendita samideano!

Tiutempe, mi estis la sekretario de la «Tri Urboj Esperanto-grupo» en Plymouth, Anglio. Mia vizitanto veturis al tiu urbo el Londono pro iu afero kaj trovinte mian adreson en «The British Esperantist» kaj en la jarlibro de U. E. A., ĉar mi estis delegito, li uzis la okazon viziti min.

Dum la tagmanĝo ĉe mi, mi trovis, ke mia gasto estis entuziasma samideano, D-ro Phizisky el Londono. Li antaŭe estis kuracisto en Pollando, kaj kiel tia li deĵoris ĉe la rusa armeo, dum la Rusa-Japana milito. Post tiu milito, li iris vivi en Londono. Ni parolis ankaŭ pri la propagando de Esperanto. La doktoro proponis fari publikan propagandon en la sama vespero. Li demandis: «Ĉu vi havas libretojn por vendi, ekzemple, *Esperanto for all* (Esperanto por ĉiuj)». «Ne», mi respondis. Aŭdinte tion, li insiste diris: «Telegrafu tuj al la Brita Esperanto-Asocio, Londono, ke ili metu mil ekzemplerojn de tiu broŝuro sur la vagonaron, kiu atingos nin hodiaŭ vespere». La saman vesperon, mi prenis la pakon da libretoj de la stacidomo. Tuj poste, ni iris al vendoplaco. Nur kelke da homoj preterpasis, ĉar kiam ni alvenis jam estis sufiĉe malfrue. La doktoro, laŭ sia persvada maniero, penis instigi min paroli al publiko, kiu ne estis tie. Li volis vidi ĉirkaŭ si almenaŭ cent homojn. «Ne, ne!», mi rifuzis akcepti lian proponon. Mi neniam staris antaŭ publiko kaj parolis.

«Iru», insistis li, «parolu kelke da vortoj eĉ sensignifaj, absurdaj, sensencaj, nur por amasigi homojn, kiuj venos pro scivolo». Mi rifuzadis agi kiel klaŭno. Vidinte mian kontraŭstaron, la doktoro diris: «Nu, almenaŭ prenu libreton kaj legu, homoj venos pro scivolemo». Fine, mi prenis libreton kaj komencis legi el ĝi tiel laŭte kiel mi povis. Baldaŭ estis ĉirkaŭ mi sufiĉe da homoj por ke la doktoro faru paroladon. Dume, mi vendadis al la aŭskultantoj la libretojn po unu penco. Ni vendis inter 50 kaj 60 ekzemplerojn. Tio kontentigis nin, konsiderante, ke estis malfrue vespere. Tio estis mia unua sperto kaj sporto pri surstrata propagando.

Pli frue, en la sekvanta vespero, ni iris al alia publika loko kaj portis kun ni ducent libretojn. Sur tiu publika vendoplaco, hazarde, ni trovis veturilon, tempe lasita de iu komercisto. Ni suriris tiun improvizitan podion kaj baldaŭ, denove pro scivolemo, staris antaŭ ni sufiĉe granda homamaso. D-ro Phizisky alparolis. Post duono da horo, subite li rigardis al sia brakhorloĝeto kaj ekscite diris al mi: «Mi devas tuj foriri por trafi vagonaron al Londono, daŭrigu!» Ne dirante unu vorton pli, li desaltis de la veturilo kaj estis perdita en la mallumo. Grandega estis mia surprizo, ĉar li ne estis flustrinta al mi vorton, ke li devis reiri al Londono tiun vesperon. Antaŭ la amaso mi ne povis argumenti, ankaŭ la doktoro jam estis for. Kaj neniam poste mi revidis lin. Mi estis treege embarasita. Neniam antaŭe mi parolis antaŭ publiko. La publiko atendis, ke mi diru ion. Kion diri? Por teni la intereson de la postulanta publiko, mi komencis paroli pri miaj vojaĝoj per Esperanto, pri miaj korespondantoj alilandaj, pri filatelio kaj tiel plu. Kiam mia parolkesto elĉerpiĝis, mi petis demandojn al kiuj mi respondis. Tio interesis kaj la demandantojn kaj la aŭskultantojn. Jam estis malfrue, kaj mi devis adiaŭi la publikon. La ĉirkaŭantoj insiste petis, ke mi venu denove la sekvantan vesperon por paroli pli pri Esperanto, ĉar multaj diris, ke ili trovis la temon interesa, kaj ke neniam antaŭe ili aŭdis pri tiu lingvo.

La sekvantan matenon mi iris vidi junulon, Bob Hawkins, kiu loĝis en mia strato. Mi sciigis al li, kio okazis. Mi petis, ke li iru kun mi la saman vesperon por helpi min kaj ricevis lian promeson. Ni iris al la sama publika placo; lia ĉeesto donis al mi la necesan kuraĝon paroli, sed la veturilo jam ne estis tie. Anstataŭ veturilo ni trovis malplenan bierbarelon. Oni diras, ke senhava barelo plej laŭte sonas. Tiu servis al mi kiel podio. Sur tiu bierbarelo mi staris kaj babiladis al la amaso.

Dum pli ol 20 jaroj nenion mi aŭdis de, aŭ pri, Bob. Antaŭ nelonge mi kun granda surprizo ricevis leteron de li per kiu li sciigas al mi, ke nuntempe li estas la sekretario de la grupo en Plymouth, kiun mi mem fondis.

**E. E. YELLAND**
**ASPREMONT, A. M. (Francio)**

**MIRU, PENSU, RIDU!** de Paul Bennemann, eldono de «Heroldo de Esperanto», Harstenhoekweg, 223, Scheveningen (Nederlando) 240 paĝoj, 15 x 21 cm. Bele bindita. Aĉetebla ĉe Libro-Servo de Hispana Esperanto-Federacio. Prezo: 54 pesetoj.

Tro malfrue, bedaŭrinde, mi prezentas ĉi tiun libron por povi oportune agordi miajn laŭdojn kun tiuj de antaŭaj recenzintoj.

Tamen, tia malfruiĝo permesas insisti pli emfaze pri la vero de la tri vortoj de ĝia titolo, ĉar apenaŭ rigardante la luksan eksteraĵon, oni ne povas jam ne miri... kvankam por funde pensi kaj eksplode ridi —en agrabla sinsekvo— oni devas ja trankvile frandi, paĝon post paĝo, la bongustan kaj varian enhavon de ĝiaj diversaj temoj. Jen, do, bela —belega!— volumo, kiu, aperinta okaze de la 30-jara jubileo de la eldonejo, fariĝas nun kvazaŭ populara kompendio de kulturo kaj arto por la esperantistaro. Du honorplenaj veteranoj: S-ro Paul Bennemann, la aŭtoro, kaj S-ro Teo Jung, la eldonisto, trafe kombinis siajn altkvalitajn kapablojn por pruvi al la esperantista popolo, ke ilia veteraneco, anstataŭ aŭguri dekadencon, estas ankoraŭ feliĉa promeso de plej superaj artaĵoj, pravigante la aserton, ke idealista koro ĉiam estas juna. Tial, konsekvence, por ilin stimuli, ĉiu juna verdstelulo devas obstine ŝparadi la necesan monon, eĉ rezignante je frivolaj bagateloj, por akiri ĉi tiun libron, kiu, per mirinde klara lingvo kaj eleganta stilo, liveras instruojn kaj amuzojn, profite helpante samtempe por faciligi esprimojn kaj frazojn, ŝajne malfacilajn, pri terminoj kaj fakoj en seriozaj aŭ gajaj sekcioj, kiujn senescepte oni legas flue kun aparta plezuro kaj streĉe avida intereso.

Kaj, fine, por doni pli ĝustan ideon pri la verko, jen kelkaj vortoj prenitaj el la sinprezento de la aŭtoro mem: «La libro enhavas multkoloran mozaikon el ĉiuj materioj: el la historio ekde la plej antaŭa pasinta tempo, ĝis la plej aktuala nuno; ĝi gvidas tra la tuta mondo kaj ĝis la steloj, en la regnojn de la naturo kaj de la tekniko, en la sciencojn kaj al la mirakloj de la lingvo. Ĝi prezentas ludojn kaj kaprompilojn, enigmojn, problemojn de multaj specoj, sed ĉion ĉi ne laŭ metoda ordo, sed intermiksita, kaj akcentante tion, kio estas stranga kaj eksterordinara, escepta, groteska kaj kelkfoje eĉ preskaŭ nekredebla; ĉar ĝi ja volas veki miregon, la plej oftan rimedon kontraŭ enuo kaj malbona humoro». Ĉu ne sufiĉe jam por gardi jam la unuajn monerojn? Jes, ja!

Kvankam iom paradokse aspektos, ke, rekomendinte ŝparemon, mi malŝparas nun gratulojn sincere adresitajn al la klera aŭtoro kaj al la kuraĝa eldonisto.

LUIS HERNANDEZ

---

**FINGRULINO.** Fabelo de Andersen, elgermanigita de H. Sirk. Bildoj de Gerda Born. Eldonis Waldheim-Eberle, Vieno, 7 - Seidengasse, 3 - 11. (Aŭstrio) Prezo, por unu ekz. kun sendkostoj, kvar int. rpk.

Jen la plej eta libro, kiun mi legis en Esperanto; do, libreto, kiu enhavas nur 16 paĝetojn po ok mallongaj linioj, proksimume. Temas pri unu el la multaj kaj belaj fabeloj de Andersen, kiujn legas ĉiam plezure ne nur infanoj, sed ankaŭ plenkreskuloj. La libreto estas bele ilustrita, kun belkoloraj bildoj ĉiupaĝe kaj preskaŭ tutpaĝe, kaj ankaŭ bele bindita en kvaronfolia formato. La traduko estas bona. Mi nur trovis du gramatikajn eraretojn: «Ŝi estis tiom delikata *kaj* kiam eĉ falis la unua neĝero...», anstataŭ: *«ke* kiam eĉ falis...» Kaj «la araneoj teksis *je* la doto...», anstataŭ: «teksis la doton...» Mi trovis ankaŭ ŝokaj la interpunkciajn signojn, kiuj sub tiu ornama formo deflankiĝas de la normo, kaj anstataŭ apartigi la frazojn, ŝajnas ke la komoj kaj punktoj kunligas la vortojn.

RIKARDO QUILES

---

**NIA LINGVO ESPERANTO** de Karl Wanselow. Eldono de «Berliner Esperanto-Verlag», Teupitzerstrasse, 11 1- Berlin-Neukölln. Prezo kun afranko: du int. respondkuponoj. La tri kajeroj, kvin int. rpk.

Kiel oni jam sciigis (BOLETIN, Decembro 1952. paĝo 435), ĵus aperis la tria kajero de ĉi tiu serio, kies tuto konsistas el tri 36-paĝaj propagandaj volumetoj, kun entute 125 elektitaj poemoj, seriozaj kaj amuzaj; el kiuj, la plej multaj estas verkitaj laŭ famaj kaj plaĉaj muzikaĵoj.

Tial, la kolekto estas konvena por deklamo, eĉ por kunkantado; do, bona materialo por distri sin dum la kunvenoj.

---

**LAGO DE COMO** - Turisma eldonaĵo de «Ente provinciale per il Turismo» (Piazza Cacciotori delle Alpi) - COMO (Italio).

Pro la sukcesplena rezulto atingita de lastjara eldonaĵo, en kvanto de 10.000 ekzempleroj, kiuj ne sufiĉis por plenumi multenombrajn petojn, «Ente provinciale per il Turismo» ĉijare eldonis novan plibelan, kolorilustritan faldfolion kaj gvidlibreton. Ili montras bildojn kaj mapon de Como, kaj per la gvidlibro oni donas klarigojn pri restadejoj kaj pri ĉefaj turismaj lokoj de la itala regiono, en kies urbo okazos la Itala Kongreso de Esperanto venontan Septembron. ERNESTO HURTADO

**38ᴬ UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**
okazos en Zagreb, la kroata ĉefurbo, de 25 Julio ĝis 1 Aŭgusto 1953.
Adreso por aliĝoj kaj informoj: KONGRESA KOMITATO Poŝtfako 213, Zagreb (Jugoslavio)

# ☆ LA LERNEJO

Kelkaj lernantoj skribis al ni esprimante dubojn pri la uzado de la prepozicio *da*.

Jen nia respondo: Tiu prepozició rilatigas la vortojn kun aliaj komplementoj, kiuj esprimas precizan aŭ ne precizan *kvanton, mezuron, nombron* aŭ *pezon.* Ni prezentas kelkajn ekzemplojn: Glaso *da* biero; spaco *da* tero; paro *da* bovoj; unu kilogramo *da* pano; multe *da* mono; sen ia ombro *da* dubo. Ankaŭ oni uzas *da,* kiam la antaŭa vorto respondas al la demando KIOM MULTE. Vidu ekzemplon: Bukedo *da* floroj (pri kvanto); bukedo de floroj (speco, ne kvanto). Ne uzu *da:* 1-e. Antaŭ la artikolo *la:* Minuto estas parto *da* horo; minuto estas parto *de la* horo. 2-e. Antaŭ la mezurvortoj: Cent pesetoj da interezo; sumo *de* 50 pesetoj. 3-e. Antaŭ la demostrativaj aŭ posedaj adjektivoj: Mi deziras iom *da* pano; mi deziras iom *de tiu ĉi* pano. Multe *da* adeptoj; ĉiutage kreskas la nombro *de niaj* adeptoj. Saluton!

ESPERANTAJ KURSOJ PER KORESPONDADO
Str. Forn, 19-**Moyá** (Barcelona) **R. Molera,** Direktoro

## PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a MAYO 1953)

| | | |
|---|---|---|
| Suma anterior | 2.068 | Ptas. |
| J. Guillomia - Barcelona | 9 | » |
| V. Fernández - Barcelona | 8 | » |
| S. Morales - Zaragoza | 10 | » |
| A. Pont - Valencia | 10 | » |
| J. Alcocer - Valencia | 10 | » |
| S. Arizmendi - Eibar | 6 | » |
| F. Campos - Valencia | 10 | » |
| A. Ballestín - Zaragoza | 10 | » |
| M. Derungs - El Ferrol | 4 | » |
| J. Bernabeu - Callosa Segura | 25 | » |
| V. Ortiz - Pamplona | 10 | » |
| M. A. Perles - Mosqueruela | 10 | » |
| F. Uceda - Baeza | 7 | » |
| A. Escamilla - Pegalajar | 5 | » |
| P. Quesada - Pegalajar | 5 | » |
| J. Casanovas - Gerona | 25 | » |
| J. Hierro - Tarrasa | 40 | » |
| M. Hierro - Tarrasa | 30 | » |
| F. González - Sabadell | 15 | » |
| A. Sánchez - Callosa Segura | 10 | » |
| A. A. - Pontevedra | 10 | » |
| Total | 2.337 | » |

*Y así, poco a poco, es como se llega lejos.*

## *NASKIĜO*

*De la hejmo de nia bonega kamarado Ramón Molera, de Moyá (Barcelono), ni ricevis akurate jenan agrablan depeŝon:*

*«La cikonio bone alportis min. Mi alvenis la 5an de Aprilo je tagmezo. Paĉjo, Panjo, fratineto Ana-María kaj avino, tre feliĉaj. Jam mi aliĝas al Hispana Esperanto-Federacio. Samideanajn salutojn! Jakobo».*

*Al la gepatroj, S-ro Ramón Molera kaj S-ino Antonia Urgellés, ni tutkore gratulas pro la feliĉa evento, kiu ankaŭ nin ĝojigas.*

## ANONCETOJ

**Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto aŭ unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.**

Svedaj ges-roj Margit kaj Herbert Levi denove vojaĝos al Hispanio kaj Portugalio dum proksimaj monatoj Junio kaj Julio; ili deziras renkonti plejeble multajn esperantistojn. Skribu kelkajn vortojn al Herbert Levi, Esplanaden, 21 - Kalmar (Svedio)

La provizora vojaĝplano estas jena: Costa Brava, Barcelona, Lérida aŭ Tarragona, Zaragoza, Madrid, Toledo, Córdoba, Granada, Málaga, Ronda, Sevilla, Badajoz, Lisboa, Porto, La Coruña, Bilbao.

S-ro Petar Stanev, 19-jara bulgaro en SELLO DOBRODAN prez Loveĉ (Bulgario) deziras korespondi pri ĉiuj temoj, ankaŭ — interesanĝi p. m. kaj p. k. —

S-ro W. Udo Segert - 305, East 75 str. New-York 21 (N. Y. - U. S. A.), deziras interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Li certe respondos kaj — afrankos per UN-pm., se dezirataj —

Loli Uceda, 15-jaraĝa fraŭlino, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Adreso: str. Virgen del Alcázar, 3-Baeza (**Jaén**) Hispanio

**MIRU, PENSU, RIDU!**
**Belega volumo kun bonega tre varia enhavo, kiu instruas kaj amuzas. Nepre havinda por miri, pensi kaj ridi!**
Prezo: **54** pesetoj. Mendu ĝin ĉe Libro-Servo de **Hispana Esperanto - Federacio**
Pelayo, num. 7 ◆ **VALENCIA**

**TESORERIA.—Se advierte a los socios que todavía no hayan efectuado el pago de su cuota (total o fraccionada), que el número extraordinario del Congreso les será remitido a reembolso de la deuda pendiente, y su pago o retorno significará la continuación o baja en la Federación**

PERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28-VALENCIA